

Ludvig Bødtcher,
Fredensborg

Omtåge sanserne forstanden,
vil bæget skumme over randen –
drag, Fredensborg! mig til dit bryst!
Og lad det sværmeriske stille
i dine skove sødt formilde
det vilde i min ungdomslyst!

Og nager kummer på mit hjerte,
er stum og dødelig min smerte,
da flyer jeg atter til dit hegn!
Gå atter i de grønne sale,
indtil at dine nattergale
har smelter skyerne til regn.

Ja, du skal leve i min tanke,
til hjertet hører op at banke
for jordisk fryd og jordisk sorg!
Til fuglen tier hist på kviste,
og træet bliver til en kiste,
og graven selv til Fredensborg!

...

Ludvig Bødtcher,
Fredensborg

tradukita de Manfredo Ratislavo

Se nebuliĝas la racio
kaj supersaŭmas en mi ĉio,
ho, Fredensborg', min tiru vi
en vian pacon, ke mildiĝu
kaj enarbare rekalmiĝu
la ŝtormo de l' junec' en mi!

Se ronĝas min ĉagren-doloro
mortige, mute en la koro,
mi ree fuĝas serĉi vin,
iradi tra la verdaj haloj,
ĝis viaj ravaj najtingaloj
per sia kant' plorigis min.³

Nur vi en miaj pensoj ĉiam
vivadu, ĝis elbato iam
la kor' en mi, sen ĝoj' kaj zorg'!
Ĝis mutos birdoj sur la kverko
kaj iĝos el la ligno ĉerko
kaj tombo – mia Fredensborg'!⁴

...

³ aŭ eble: plorsolve resanigis min.

⁴ La dana vorto „Fredensborg“ signifas „pac-kastel“-on. Ĝi estas reĝa kastelo kaj parko situanta sur la insulo Zelando ne malproksime de la dana ĉefurbo Kopenhago.

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo estas LUDVIG BØDTCHER (*1793-04-22 – †1874-10-01). Traduko de la Dana poemo “Fredensborg” de LUDVIG BØDTCHER (*1793-04-22 – †1874-10-01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-09.*

Arg-238-476 (2004-05-17 16:29:53)

MR-156-2 / Arg-238-477 (2004-05-17 16:13:58)